



PILO-PRESS

Internacia
Informservo



Eldonanto/Herausgeber:

Ludwig Pöckel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (09 11) 46 36 49; 51 42 69

N-ro 25/1976 - 21 junio 1976
Aperas ĉiusemajne

Poŝta stampo kun Esperanto-teksto
okaze de la IFEF-kongreso

Internacia Fervojojista Esperanto-Kongreso

Skelleftea (pp) - De la 12-a ĝis la 18-a de junio okazis en la nordsveda urbo Skelleftea la 28-a Kongreso de la Internacia Fervojojista Esperanto-Federacio kun 482 partoprenantoj el 19 landoj.

Dum la solena malfermo de la kongreso, dimanĉe, la 13-an de junio, la prezidanto de IFEF, Joachim Giesner, FRG, komparis la mondan situacion nunam kun tiu en la pasinta jaro kaj ripetis kelkajn el siaj vortoj dum la kongreso 1975 en Villach, Aŭstrio, kie li diris, ke 9 jardekoj de la Esperanto-movado pruvis, ke ju pli maltrankvila estas la mondo des pli suferas la agado de la esperantistoj. Maltrankvila mondo ne signifas militojn, sed jam la stato, ke hodiaŭ neniu scias, kio okazos morgaŭ, la inflacio, la konstanta necerteco pri la energiprovizado, la malbalance inter sataj kaj malsataj homoj, tio ĉio signifas maltrankvilam mondon.

Joachim Giesner instigis la membraron de IFEF al pli da aktiveco estonta por niaj komunaj aferoj kaj al fortige de niaj agadoj.

La kongresan malfermon ĉeestis honoraj gastoj de la urba deputitaro de Skelleftea kaj de fervoja instancoj svedaj.

El la ampleksa programo ni citu la kunvenon pri "ideo-trovade", kiu gvidis Dieter Hartig el Bremen. Li petis la ĉeestantojn diri ĉiujn eblajn ideojn rilate al la temoj "Informade kaj Varbade". Li faris 17 koncizajn demandojn kaj la ĉeestantoj respondis per multaj ideoj. Estis interkonsento, ke tiu nova formo de ideotrovade bone kaj vigle funkcias.

La ĉi-jara fakprelego temis pri la "Sveda Ercfervojo". La preleganto, Yngve Forslund, sukcesis doni al la aŭskultantoj bonan superrigardon pri la historio kaj evoluo de la transporto de erco al Narvik.

Okazis diversaj organizaj kunvenoj, de la IFEF-estraro kaj komitato, kunveno de la terminara komisiono, ekskursoj, urba akcepto, kaj distraĵoj. Ludis la Kvarteto Esperanto, speciale dum la kongresa balo, kaj la Pola Esperanto-Teatro je la nomo A. Grabowski prezentis la teatraĵon "Proksima Nekonato" de Aleksander Scibor-Rylski.

Ne mankis la tradicia futbalmatĉo. Kaj okazis la futbala miraklo de Skelleftea: La IFEF-teamo por la unua fojo gajnis, je 5 kontraŭ 3. Pri tiu rezulto la kongresa bulteno komentas: "Ĉu la gajno de la IFEF-teamo estis pro tio, ke la kontraŭludantoj estis virinoj? Certene, ĉar ambaŭ teamoj vere bone ludis. Do, ŝajne la IFEF-teamo pli-fortigis."

La venontjaro IFEF-kongreso okazos en Swanwich, Britio, de la 13-a ĝis la 20-a de majo 1977.

Oni reelektis la malnovan IFEF-estraron.

La tuttaga ekskurso komenciĝis je la 14-a horo kaj finiĝis je la 4-a horo matene. Kaj nekteze, en la vilaĝeto Ärvidsjaur, norde de la la Arakta Cirklo, prezidanto Giesner fermis la kongreson. Li dankis al la LKK kaj speciale al gea-roj Forslund kaj diris i.a., ke ĉi tiu kongreso estis "la kongreso de surprizoj". Neniam antaŭe fermi-

ĝis kongreso meznokte sub hela ĉielo. Cetere ĉiu ekskursanto ricevis ateston pri la transiro de la Arka Cirklo.

-.--.-.-

La kongreso akceptis jenam kongresam rezolucion, kiu tekstas:

"La 28-a Kongreso de la Internacia Fervojoista Esperanto-Federacio (IFEF), okazinta en Skelleftea (Svedio) kun 482 partoprenantoj el 19 landoj denove

konstatas, ke la lingvaj komplikajoj en la translimaj internaciaj trafiko kaj turismo same kiel en internaciaj konferencoj kaj kunvenoj neniel malkreskis, sed kontraŭe pliakriĝis, ekzemple pro apliko de aldonaj laborlingvoj en internaciaj organizaĵoj, rimarkigas, ke la fervojaj entreprenoj kiel ankaŭ sindikatoj kaj aliaj organizaĵoj de fervojistoj samsence agas, preferante unuopajn lingvojn de pli potencaj ŝtatoj, spite al evidentaj malavantaĝoj, ekzemple altaj kostoj, tempoperdo, neekzakta tradukado kaj ofta nekompreno,

akcentas, ke jam pro pedagogiaj kaj fizikaj kaŭzoj neniu homo kapablas lerni la lingvojn de ĉiuj popoloj, sed ke aliaflanke pro nacia prestiĝo neniu nacioj pretas apliki la lingvon de nur unu popolo, aparte atentigas, ĉiujn fervojojn, sindikatojn kaj fervojistajn organizaĵojn, ke ekzistas unika ebleco ŝpari grandegajn sumojn, se oni akceptas komunan neŭtralan lingvon facile lerneblan, bone kompreneblan, esprinkapablan kun egalaj ŝancoj por ĉiuj, nome la internacian lingvon Esperanto, kaj pro tio

proponas al la fervojoj, sindikatoj kaj ĉiuj fervojistaj organizaĵoj plej rapide utiligi al si la eminentajn ekonomiajn avantaĝojn de tia komuna, ĉie aplikebla lingvo,

deklaras, ke la Internacia Fervojoista Esperanto-Federacio (IFEF) pretas helpi, por ke tiu ĉi celo estu atingata kiel eble plej baldaŭ. Skelleftea en junio 1976.

Por la IFEF-prezidantaro

Giessner

+++++

Adolf Burkhardt en Svedio

Vessigebro (pp) - Pastoro Adolf Burkhardt, Bissingen, restadis kiel gastpreleganto en la jarkonferenco de Kristana Esperanto-Ligo, la sveda sekcio de KELI, de la 26-a ĝis 30-a de majo 1976. Tiucele li pretigis novajn tradukojn de kvar ekleziaj kantoj. Li predikis en du Esperanto-diservoj.

Entute pastoro Burkhardt faris kvin prelegojn pri jenaj temoj:

Kantrezoroj en Esperanto - La lingva situacio -

Evolu-tendencoj en nia lingvo - La situacio de KELI -

Problemoj ĉe traduko de kanto-tekstoj

Kadre de la konferenco okazis la jarkunveno de Kristana Esperanto-Ligo.

Komuniko de AGFA-GEVAERT

Mortsel (Belgio) -(pp) - Sub la titolo "AGFA-GEVAERT reklamas en Esperanto" la belga firmao AGFA-GEVAERT sendis al Pilo-Press jenan komunikon (dato 1976 06 15 Ref. 2295/PP):

"La monda fotografia entrepreno Agfa-Gevaert eldonis malgrandan serion de diapozitivaj kun akompana sursonbenda teksto en la Internacia Lingvo. La serio temas pri Agfa-Gevaert ĝenerale kaj pri ĝia produkto-sortimento kiel ekz. kameraoj, projekciiloj, fotokopiiloj, aparatoj por la mikrofilmo ktp.

La serio estas senpage prunteprenebla de organizantoj de internaciaj renkontiĝoj, ekspozicioj ktp. Interesiĝantoj sin turnu al Agfa-Gevaert N. V., Reclame en Redactie, Septestraat 27, B-2510 Mortsel, Belgio."

Prelego pri lingvo-orientiĝa instruado

Waiblingen (pp/mv) - La 16-an de junio okazis - post malfacilaj, sed bonaj preparoj - en la Staufer-Lerneja Centro en Waiblingen (proksime de Stuttgart) kunveno, al kiu estis invititaj pere de la rektoroj de ĉiuj elementaj lernejoj ĉiuj gepatroj el Waiblingen, Korb kaj proksimaj lokoj. Prof. d-ro Helmar Frank, direktoro de la "Esplor- kaj Evolucentro pri objektivigitaj Instru- kaj Lernprocedoj" (FEoLL), Paderborn, parolis pri "Lingvo-orientiĝa instruado" helpe de ROBIMAT-aparataro por lernantoj.

Li klarigis, ke post multjaraj provoj oni eltrovis, ke Esperanto estas la plej taŭga lingvo, por ebligi al infanoj pli facilan lernadon de lingvoj. Ĉeestis ĉirkaŭ 80 gepatroj, kiuj kun intereso sekvis la paroladon, kaj la prezento de ROBIMAT kaŭzis multajn demandojn.

Interesite sin enskribis multaj gepatroj en listoj por ricevi pliajn informojn el Paderborn aŭ por sin anonci al la lingvo-orientiĝa instruado. Parolis ankaŭ Hermann Behrmann, prezidanto de "Eŭropa-Klubo" klarigante ties celojn. Kiel prezentisto de ROBIMAT agis Drago Smolić, kiu ankaŭ parte filmis la kunvenon.

Esperanto en Radio

El la leterkesto de Radio Roma

Demando de Ernst Höpfler, kiu estas unu el la plej regulaj aŭskultantoj kaj korespondantoj: "Vi ankoraŭ ne indikis, ĉu la Roma Esperanto-grupo kunlaboras kun Vatikana Radio, aŭ ĉu la stacio havas propran esperantiston, kiu prizorgas la Esperantlingvan kontribuon. Vi konsideras la uzon de Esperanto granda antaŭenpaŝo, sed ĉu oni vere kredas, ke multaj esperantistoj aŭskultos la tiel malfruan elsendon tagon post tago, por iam aŭdi Esperantan sentencon?"

Respondo de Radio Roma: "Ni respondas, ke la nuna mallongeco kaj malofteco de la Esperanto-anguletoj de Vatikana Radio ne postulas la ekziston de speciala Esperanto-redaktoro; momente, prizorgas laŭbezone la tradukojn Romaj esperantistoj, ekzemple pastro Giacinto Jacobitti, sen starigo de aparta sekcio (la itala fako de Vatikana Radio ankaŭ

okupas sin pri la Esperanto-anguletoj).

Koncerne la valoron de la decido de Vatikana Radio, kompreneble ĝi ne kuŝas en la enhavo aŭ en la daŭro de la Esperanto-elsendo, sed en la fakto mem, ke instanco tiel singardema kaj eĉ "konservativa" kiel Katolika Eklezio konsiderinde ŝanĝis sian sintenon fronte al Esperanto, kaj komencis oficiale uzi ĝin: ĝis nun, fakte, ekzistis unuopaj katolikoj (kvankam kelkfoje elstaraj, kiel la Papo Pio la deka), kiuj simpatiis al Esperanto, sed la oficiala sinteno de la Eklezio en si mem estis skeptika: cetere, dum la alparolo al la partoprenantoj en la Katolika Kongreso en Romo de aŭgusto pasintjara, unuafoje la Papo publike agnoskis la Esperantistajn klopodojn."

Radio Vieno. Eble esperantistoj akceptas politikajn opiniesprimojn en Esperanto de neŭtrala flanko. Jen do, kion diris d-ro Alfred Macher en sia lastsemajna komentario: "Ŝtatvizitoj al Aŭstrio oftigiis. Ili kostas multan monon en tempo, kiam oni predikas al ni ŝparadon, kaj ili ĉagrene ĥaosigas la urbcentran trafikon de Vieno - pro la policaj vojsekurigoj. Sed al malgranda, neŭtrala Aŭstrio tiaj ŝtatvizitoj havigas valorajn rilatojn ĉiuflanke, informojn, kiuj ebligas sinpretigon por venontaj efikoj de ĝermantaj evoluoj. La vizito de Reĝo Hussein estis modeleca ekzemplo. Aŭstrio bezonas bonajn kontaktojn kun la Proksima Oriento. La efikoj de la tiea konflikto trafas nin ĉiam tre grave, ĉar ni a U N O - kontingento sur la Golan-Montoj estas la plej granda. V I E N O estas la sidejo de la petrolproduktantaj OPEC-landoj, kaj ni havas ekonomi-politikajn interesojn en la Proksima Oriento.

Niaj eksportoj tien jam kreskas. Nian tiel-nomatan Pinzgauer-veturilon, kiu taŝgas ankaŭ por ekstreme malfacila tereno, Reĝo Hussein persone elprovis, intencante aĉeti konsiderindan nombron de tiu tipo. Do, niaj ĉagrenitaj aŭtomobilistoj scias, ke la tiom trafik-ĝenaj ŝtatvizitoj estas por ni, aliflanke, neeviteble **n e c e s a j !**"

En la venonta elsendo (1976-06-26/27) Radio Vieno prezentos i.a. felietonon memorigan pri Robert Stolz, okaze de lia mortotago, kaj s-ino Charlotte Hube, edzino de la direktoro de la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno, kantos unu el la plej popularaj melodioj de Robert Stolz "Lastaj rozoj floras ĉe l'erikejo" (germanlingve: "Auf der Heide blühen die letzten Rosen"), kompreneble en Esperanto, akompanate de profesoro Elisabeth Pohl.

Radio Varsovio. La leterkestoj ĉiam estas interesaj kaj informriĉaj, speciale rilate al la opinioj de aŭskultantoj al unuopaj programeroj. Unu eminenta esperantisto skribis i.a., ke la enlandaj novaĵoj ĝenerale ne estas interesaj, ofte tro sekaj. Li ja havas vivan intereson pri Pollando, li tamen deziras aŭdi novaĵojn, kiuj rilatas al la socia kaj ne al la politika vivo de Pollando. Jen problemo, kiu jam kelkfoje estis tuŝita en leterkestoj. Iam iu aŭskultanto eĉ opiniis, ke ĉiutagaj novaĵoj en Esperanto entute ne estas necesaj, ĉar li ja povas rigardi la novaĵojn en la televido sialanda. Bone, tion oni povas, sed mi demandas ĉu la Internacia Lingvo ne ankaŭ evoluu sur la - vere grava - politika kampo? Kiel ni volas pretendi nian aragon enkonduki Esperanton en la internaciajn rilatojn, kiuj ja ĉefe estas politikaj, se ni rifuzas uzi Esperanton ankaŭ, se temas pri politiko. Krome laŭ nia opinio, la Varsoviaj elsendoj ja elstaras ĝuste pro tio, ke ili aplikas Esperanton en la same ampleksa kadro kiel la naciajn lingvojn. Kaj al tio nepre apartenas la ĉiutagaj radiaj ĵurnaloj. Simpla afero, sed pri simplaj aferoj oni povas havi diversajn opiniojn, estis Varsovia komento. - Cetere dum la pasinta semajno eniris 115 korespondajoj.

"La interparoloj de Edward Gierek kun la avanaj personuloj de Federacia Respubliko Germanujo estas gvidataj en atmosfero amikeca...." Jen frazo el unu el la multaj komentoj kaj preparoloj de la vitizo de Edward Gierek en FRG. Tiu frazo ankaŭ kuragiĝis Jan Klimek en sia "Temo de la Semajno" al la espero kaj deziro, ke la rilatoj inter la esperantistoj de Pollando kaj FRG fariĝu pli intimaj. Ni esperu tion!